# Kio estas KOŜIN-KO?

KOŜIN-KO estas tradicia folklora kutimo en Japanio.

Laŭ la Taoismo, kiu komenciĝis en Ĉinio, ni, homoj havas tri bestetojn interne de nia korpo; unua en nia kapo, dua en niaj internaj organoj kaj tria en nia malalta parto de la korpo. Tiuj bestetoj estas nomita SAN-ŜI.




Oni kredas, ke la elvokas kapdolorojn kaj stomakodolorojn, sed ne nur tio, ili venas de niaj korpoj en la nokto de la KOŜIN. En la nokto de la KOŜIN, kiu havas ciklon de sesdek noktoj, la SAN-ŜI, raportas niajn malbonajn kondutojn al TENTEI, la dio.

TENTEI, la dio, kiu estas kredita prezidi homajn vivojn, decidas nian vivdaŭro, laŭ la raportoj, kiujn li ricevas de SAN-ŜI.

Por eviti de la SAN-ŜI raporti niajn farojn al dio, ni maldormas tra la tuta nokto kaj observas la bestetojn, por ke ili ne foriru de niaj korpoj - tio estas nomita la KOŜIN-KO.

La KOŜIN-KO, estis enkondukita de Ĉinio dum la 8a jarcento (Nara Epoko), kajestis igita de nobelaro dum la 12a jarcento (Heian Epoko). De la 17a ĝis la 19a jarcento (Edo Epoko), tio estis ligita kun Budhismo kaj la japana religio Ŝintoo, tio disvastiĝis kaj fariĝis populara inter komunaj popoloj.
Kaj nun, oni povas vidi restaĵojn de la KOŜIN el ĉiuj de la tumuloj kaj turetoj tutlande en Japanio.

TOKYO KOŜINDO estas grupo de anoj, kiu praktikas kaj helpas la rekonstruon de KOŜIN-KO.

## TOKYO KOŜINDO

Adreso: Mukoujima 3-7-4 Sumida-ku, Tokyo
TTTejo: www.koshindo.com